

AVENO 9a

10-jara jubileo de la marto 1994

Asocio de Verduloj Esperantistaj (fondita 1984)

Karaj ge-AVE-anoj,

Ni festas la 10-jariĝon de AVE je la 27-a de marto; se ni prenu la unuan konferencon de AVE en Bruselo, preskaŭ okaze de la unua konferenco de la Eŭropaj Verduloj en Lieĝo, kiel fondo-tago.

Elkoraŭ dankon al Christopher Fettes, kiu organizis ĝin !

Necesas krome mencii, ke la ĵurnalo Ekoperanto de Rezö Baross preskaŭ paralele ekfunkciis kaj el tiu sekvis VERDire (se mi ne eraras).

Claude Rouget demandis sin en VERDire 12, ĉu la informoj de AVENO ne povus aperi en VERDire. Certe jes, ĉiu rajtas preni la informojn el AVENO kaj publikigi ilin (se eblas kun font-indiko) senpage.

La celo de AVENO estas, ligi la Verdulojn Esperantistajn kaj tiamaniere montri al ni kaj al la aliaj, ke ni ekzistas kiel grupo; ni estas nun 43 respondintaj AVE-anoj.

VERDire estas nemalhavebla, ĉar ĝi montras la ekologian fakon al la aliaj Esperantistoj kaj Esperanton al la aliaj ekoloĝoj. Same gravas, ke VERDire flegas la ĉi-rilatan terminologion. La aspekto de VERDire estas profesia kaj ekologia.

Kial ni estas ankoraŭ nur malmultaj ? Ekzistas kelkaj kaŭzoj, mi havas ideon pri ekologia simileco:

malrapide kreskas arboj kiuj loĝas en malkomforta medio aŭ estas de speco kiu kreskas malrapide kiel ekz-e la taksuso; ĉi lastaj vivas tre longe (do, estas espero).

Multaj Verduloj prilaboras tiom da aliaj problemoj ke ili ne emas okupi pri Esperanto. Multaj lernadas aliajn lingvojn sed ne pretas preni la riskon eklerni Esperanton. La risko estas ke "neniu" parolas Esperanton. Sed ni montras, ke tiu argumento ne validas.

Hodiaŭ mi volas informi pri:

- la Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj (EFVP)

- la (al mi konataj) aktivecoj de niaj kun-AVE-anoj

La Eŭropa Federacio de Verdaj Partioj estas preskaŭ same aĝa kiel AVE. Je la "Unua Koncilio de EFVP" en Vieno la 28-an ĝis 30-an de januaro 1994 estis elektita je la unua fojo estraro: Leo COX (ĝenerala sekretario, kiu kun-fondis EFVP), Niki KORTVELYESSY (parolantino, el GB/Hungario), Pekka SAURI (parolanto, el Finnlando), Brigitte ERNST de la GRAETE (trezoristino, el Belgio kaj membro de Eŭropa Parlamento), Marie-Christine AULAS (Francio), Heidi MEINZOLT-DEPNER (Germanio) kaj Paolo Bergamaschi (Italio).

Mi estis en Vieno kiel reprezentanto de AVE kaj montris dum sabato Esperanton - ĉefe rilate al ekologio, etnologio kaj scienco. Pluraj studis la materialon kaj kelkaj jam konis Esperanton. La plejmulton de ili mi alparolis angle. La delegitino de Litovaj Verduloj estas esperantistino kaj ni renkontiĝis plurfoje. La polaj - kaj la francaj - Verduloj eldonis eĉ broŝureton pri iliaj principoj en Esperanto, krome ili eldonas ĵurnalon en la angla: "Green Brigades-Ecologists' Paper", Kemia Fakultato, ul. Ingardena 3/100, PL-30-060 Krakovo. Unu de la Hungara Verduloj iam lernis Esperanton, sed nun pli bezonas la anglan ktp...

Leo Cox de la Verda Federacio informis min, ke antaŭe iu alia tre insistis por Esperanto; la sukceson ni povis vidi en VERDire 13, p. 17, la trilingvan titolon "La Eŭropaj Verduloj" - tio ankaŭ estas je la originala listo ! Do, EFVP jam uzas Esperanton.

Mi kunportis la Esperanto-version de la gvidlinioj de la Federacio; kelkaj kunprenis ĝin por montri al konatuloj kiuj parolas Esperanton. Mi almetas kopion de la gvidlinioj por Vi; ankoraŭ mankas la traduko de la statutoj. La teksto estis kontrolita nur inter la tri tradukistoj, do se iu de Vi trovas pli bonan esprimon aŭ simile, Vi ne hezitu sendi la proponon al mi.

La Eŭropaj Verduloj nun konsistas el 27 partioj (la nombro da voĉoj dependas plejparte de la procentaĵo je la pasinta baloto). Aldone al la listo en VERDire 13 estas 4 novaj membroj: Rusa Verda Partio (provizore de St.

Petersburg), Ukraina Verda Partio, Verda Alternativo Hungaria, Skotlanda Verda Partio. La aspirantoj estas: Eko-socialistoj de Slovenio, Sendependaj Demokratoj de Pollando, Verdaj Partioj de Katalonio, Albanio, Serbio, Litovio, Latvio.

Internaciaj delegitoj estis el: Kanado, Usono, Meksikio, Brazilio, Niĝero (kie estos ĉi-jare la tut-globa Verda renkontiĝo, se mi ne eraras), Aŭstralio kaj Japanio. Kiel reprezentanto de indiĝenaj popoloj ĉeestis Inila-Wakan (de la Dakota tribo, Nordameriko). Mike Feinstein el Kalifornio montris la elektronikan reton de la Tutglobaj Verduloj <socalgreens@igc.apc.org> kaj publikigis ampleksan liston de tiaj e-poŝtaj adresoj.

La "konsilio" akceptis kelkajn resoluciojn:

- Pri la celoj kaj prioritatoj de la federacio; reprezenteco en la EP.
- Ekologiaj tezoj de la Verduloj de la "EFTA"-ŝtatoj rilate al EU.
- Postulo de redukto de la de 16%-hurdo je balotoj en Malto.
- Ultra-Nacionalismo kiel diskutadotemo.
- Regiono de Mediteranea kaj Nigra maroj kiel diskutadotemo.
- Subteno de s-ino Artemkina (Rusio) kontraŭ kalumnio.
- EU-Komisiono por helpi je la Nord-Irlanda konflikto.
- Kontraŭ la Gabĉikovo akvorezervujo de la Danubo.
- Dokumento de la Internacia Pac-Oficejo (Zürich) por nuklea malarmado.

Oni prokrastis la diskuton de la ampleksa prijuĝo de Eŭropa Unuiĝo.

Agadoj de AVE-anoj

Do, AVE ja estas same kiel reto super tut-globa kompreno kaj agado. Nia ĉefa celo estas partoprenado en civitanaj iniciativoj, verdaj partioj kaj informo pri Esperanto. Mi almetas kopion de la malnova informilo pri AVE kaj petas proponojn por la parto "Aktivecoj".

Ĉi tie mi nun listigas la agadojn, laŭeble kun indiko de la personoj. Mi scias, ke nek la listo estas kompleta, nek la informoj egale traktitaj de mi; la sinsekvo estas hazarda. Se iu sentas bezonon por plia informo bonvole sendu la necesajn informojn al mi.

Kiel oni vidas, ni AVE-anoj multflanke agadas (ne ĉiuj menciitaj estas AVE-anoj, sed tiuj aliaj kunlaboras kun AVE-anoj). Kaj oni ankaŭ komprenas ke multaj de ni ne havas tempon krome agadi ene de AVE.

monda solidareco

Informilo de "Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato" - Esperantolingva eldono; krome en la franca kaj la hispana. Projektoj por ebligi al malsataj homoj produkti mem nutraĵojn. Fonds Mondial de Solidarité contre le Faim, 15 rue Victor Duruy, F-75015 PARIS, (PCK. CCP PARIS 10.734.96 Z)

VIDU

monata letero de la Agado "E-vid-E-nt-E". Temas pri organizo kaj financado de okul-kuracado kaj okul-vitroj por homoj en malriĉaj landoj.

Jacques Tuinder, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH, HEEMSKERK;

konto ĉe UEA: **jajts**; ĉe NL-poŝtbanko N-ro 10.20.100.

The Worker Esperantist

Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio (SATEB). Plejparte politikaj temoj rilatante al la (tutmonda) socio, paco, sindikatoj kaj ekologio. *Alan Gould*, Woodrising, Thorn Lane, Goxhill, South Humberside DN19 7LU.

Laŭte (ISSN 0150 5823)

50 paĝa ĵurnalo de la Amika Esperanto-Rondo. Enhavas tutmondajn debatojn, ekzemple pri naciismo, literaturecajn verkojn, poezion, anoncetojn. *Christian Baudé*, Cargue Sac, F-47470 BEAUVILLE. Li eldonis ekologiajn broŝurojn en la kadro de SAT-broŝurservo, kaj dissendas ekz-e: Alvoko de la Asocio por la Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj (10 FF); Por ekologia socio, de M. Bookchin (15 FF); Kancero kaj

ekologio (15 FF); Katastrofplano pri Fessenheim-atomcentralo (5 FF); Ekologio: ĉu ideologio ? (W. Gunther) (3 FF). Krome li disponigas por ekologianoj kaj naturamantoj renkontiĝejon je 8-hektara bieno en suda Francio.

Scienca Revuo (ISSN 0048-9557)

100 paĝa ĵurnalo de la Internacia Scienca Asocio Esperantista. Kutime ĉiu ĵurnalo havas temaron pri natursciencoj, tekniko kaj pri sociaj sciencoj. Tre bone redaktita de *Rudi Hauger*, Ringst.13, CH-8172 NIEDERGLATT. Li petas sciencajn artikolojn pri ekologio.

Socikredito

Tre interesa verketo pri reformo de la monsisistemo - bedaŭrinde sen rilato al ekologio (se mi ne eraras) - de majoro C.H.Douglas (1919), tradukita esperanten: *Brian Leslie*, 12 Queens Road, GB-TN4 9LU, TUNBRIDGE WELLS.

Hejmoj

Sezona Bulteno Informanta pri la Esperantaj Komunumoj; iel ligita al la Asocio Hejmoj de Internacia Kulturo. Mi mencias kelkajn hejmojn kiuj uzas Esperanton, kaj pri kiuj mi havas informon: *Pascal Lécaille*, 138 av. St. Exupéry, F-69500 BRON.

- Arrout, en la Pireneoj (P. Lécaille)

-Mondhejmo, Ekologia Centro Internacia (Cauduro, F-34360 ST. CHINIAN, Tel. 67 97 26 63) aŭ Akiles Sanz, Steglitzer Damm 5a, D-12169 BERLIN.

-Ĉaĉu (Benin/Afriko) projekto de Monda Kunagado kun la celo subteni la afrikan esperantistaron - utiligo de la tereno, fondi kooperativon, flegi vidmalsanojn Annsibyll Kamphausen, Ludwig Büchner S. 6, D-64285 DARMSTADT

- Ekologia Domo, Lerneja Bahaa kaj Esperantista (ekologia agrikulturo, sun-energio, harmonio, vegetarana nutrado): Ines Comabella kaj Paco Comejero, Urb. Tossal Gros 24, E-12004 CASTELLON.

Centro pri Ekologia Medicino

Informoj de *D-ro med W. Gunther*, Schulstr. 7, D-34292 AHNATAL

Albanio agado

Temas pri helpo al infanoj de rifuĝintoj el albanio en Heemskerk (NL) pere de esperanto-parolanta albana instruisto kaj al sendado de materialo al albanio:

Ton Verwoerd, Luxemburglaan 545, NL-1966 MJ HEEMSKERK.

!!! Bonvolu ne forgesi alskribi pri la uzado de Esperanto viajn samlandanajn kandidatojn por la Eŭropa Parlamento; ne ekzistas komuna leter-teksto. Sed ekzistas:

-Plurlingva flugfolio (WAAROM, KIAL ..) *mi kunsendas*

-Propono de nia ĝenerala inform-folio (Celoj, ...) *mi kunsendas*

-Esperanto-versio de la Gvidlinioj (vidu p.1). Havebla je 2 irk-oj (se eblas).

Speciala alvoko al geinteresuloj:

Vi situas en la adreslisto de AVE sen indiko de membreco; se vi ŝatas iĝi membro de AVE, bonvolu respondi al mi (la nuna sekretario) kun indiko, ĉu vi ŝatas, ke via adreso aperos en la venonta adres-listo por ebligi rektan interŝanĝon. La membreco ne kostas monon, sed eble kunlaboron je traduko de teksto, ekz-e la tekston de la fald-folio "KIAL" kune kun la celoj de AVE en vian lingvon, aŭ skribon de letero al via regiona "verda" deputito, subteni Esperanton.

Elkore salutas Via sekretario de AVE: Manfred Westermayer, Kandelstr.62, D-79194 Gundelfingen
e-posxto: (ne plu aktuala!!) TILL_WESTERMAYER@fr.maus.de, UEA-konto: avex-z